NENIO estas certa pri la deveno de la Rovereta kastelo. Eble la monteto sur kiu nun estas konstruita la kastelo estis loĝata eĉ en la prahistoriaj tempoj. Sub la romana imperio, ĉi tie estis iu «vicus», t.e. malgranda vilaĝo. Kredeble tiu ĉi Vicus malaperis je la mal-supreniro de la barbaroj ĉar la nuntempa nomo de Rovereto aperis nur en la mez-epoko. Kiu ekzamenas la fundamentojn de la kastelo trovas kelkajn ne dubajn postsignojn de tre malproksima deveno. Ekzemple en la interno de Malipiera remparo, konstruita de Venecianoj, oni vidas firmegan angulforman bazon de turo, konstruitan per dikaj grizaj blokoj. Alian pecon de egala masonaĵo oni vidas en la dua korto, tuta egale al la placa turo en Trento: kiel tiu ĉi, ĝi povas esti de romana deveno.

Rovereto, pro la forfinigo de la nobela familio el Lizzana, pasis al la grafoj de Katelbarko: Vilhelmo la Granda estis tiu, kiu konstruigis aŭ reefabrikigis la kastelon sur alia antaŭe ekzistanta. Tio ĉi okazis ĉirkaŭ en jaro 1300. La Kastelbarka kastelo estis multe pli malgranda ol la nuntempa. Tiu ĉi konstruaĵo en 1449 (do ĉirkaŭ 150 jaroj post la konstruigo farita de Vilhelmo la Granda) estis vokata *Bastia antiqua apud flumen Lini* kaj pli fortigas konjekton ke la kastelo estas nur la reefabrikaĵo de alia antaŭe ekzistanta. La 5-an de decembro 1416 Rovereto pasis al Venecia Respubliko, kiu donis al la urbo gravajn privilegiojn, kaj pligrandigis la kastelon.

En la milito inter Sigismundo, duko de Aŭstrio, kaj Venecia Respubliko (1487), la urbo estis siegita, prenita, rabita. Post la falo de la urbo la batalo daŭris ĉirkaŭ la kastelo, kiu falis glorge.

Estis eposa batalo en kiu la malgranda Rovereto kontraŭstaris al la duka soldataro (pli ol tridekmil batalantoj, gvidataj de famaj estroj, provizitaj de ĉiuj militaj iloj kaj de siegmaŝinoj). La siego daŭris de la 23-a aprilo ĝis la 30-a de majo. Post la paco, Rovereto restis ankoraŭ al la Venecia Respubliko, kiu konstruigis la urbajn muregojn, rekonstruigis la kastelon sub la direkto de la famega Bartolameo d' Alviano. Kiel konsekvenco de la ligo de Cambray kaj de la batalo ĉe Chiaradadda en kiu Venecio malvenkis, Rovereto pasis al la imperiestro Maksimiliano.

En jaro 1782 la kastelo estis senigita de ĝiaj fortikaĵoj kaj en 1796 okupita de Francaj soldatoj per malmulte da tempo; la sekvantan jaron ĝi estis detruita de fair-ego. Restarigita en 1833, ĝi estis destinata kiel malriĉulejo, poste kiel komunuma domo de punlaboroj. De 1859 ĝis la falo de Aŭstrio ĝi estis ŝanĝita en soldatejon, kaj ankoraŭ dum la granda milito ĝi estis okupita de militistoj. Kanono de 305, lokata en la kastela fosaĵo, sendis siajn mortdonantajn kuglojn sur la italaj vicoj de monto *Zugna*. Ĝi estis tamen efike kontraŭfrapita de niaj militistoj.

Nun en ĝi estas la Itala Historia Milita Muzeo, riĉa je 25 ĉambroj: ĉiu samideano alvenanta Rovereton ne forgesu ĝin viziti.

Giulio Matucella

Con dieci centesimi si acquista in qualunque ufficio postale un modulo di vaglia che può servire benissimo per inviare dieci lire per l'abbonamento all' «Itala Esperanta Revuo». Il suo indirizzo è sempre: S. Vito al Tagliamento.

LA HOMO KIU VOLIS SIN VENĜI

(Novelo de EGISTO ROGERO)

— Al vi, Laŭrenco Maŭri — diris la karcerestro, prezentante al li, post esti subskribinta kaj ankaŭ stampinta ĝin, la folion de liberigo, kiu reallasis lin en la mondon inter la homoj.

Kaj rigardante lin per la malvarmaj okuloj, kiujn la longa kutimo de la metio estis igintaj senemociaj, li diris ankoraŭ:

— Vi estas libera. Kaj ĉar vi estas ankoraŭ juna, vi povas refari al vi novan vivon.

Kaj, nekredebla afero, li donis al li eĉ la manon.

— Pro via bona konduto! — li klarigis. — Dum tiuj ĉi dek jaroj vi nenian enuon donis al mi.

Kaj li ridetis. Estis la unua fojo, dum dek jaroj, en kiu Laŭrenco Maŭri vidis la rektoran rideton.

Sed li ne ridetis. Li prenis la folion, li ĝin faldis kaj metis en la parerujon, kiu estis redonita al li kun siaj burgaj roboj, salutis kaj eliris.

Li, do fine, estis libera. Sed nenian gojon. Li havis la koron sensentema, malvarma. Li repensis, dum li preterpasis la sojlon de la malliberejo, la vortojn de la karcerestro kaj lian rideton. Kaj tiun ĉi fojon li ridetis. Refari al si vivon... Sed se li malamas nun la vivon! Kaj kun la vivo la homojn, Dion, ĉion kaj ĉiujn. Li estis ankoraŭ juna, jes. Enirinta tridekjara, li nun eliris el tie kvardekjara. Malgranda diferenco, do. Li estis ankoraŭ riĉa: neniu estis povinta forpreni de li liajn rentojn. Dum tiuj jaroj de ripozo por ili, ili estis amasigintaj, por liaj nunaj tagoj de libereco. Kaj li estus

uzinta ilin por sin venĝi de kiom la homoj estis suferigintaj lin.

Li estis mortiginta homon, kiu sin diris lia amiko pro virino, kiu trompis lin. Ankaŭ ŝi estis fininta malbone, sed tio ne sufiĉis al li. Li estis bona kaj estis punita. Kaj hodiaŭ, post dek jaroj da mallumo, li retrovigis libera, riĉa kaj ankoraŭ juna. Kaj sentis en la koro iom da malamo, kiun li estus sciinta elirigi, tie, inter la homoj inter kiuj li revenis.

Apenaŭ li eliris el la malliberejo li rigardis ĉirkaŭ si. Estis bela mateno de aprilo, plena de suno. Li faris kelke da paŝoj, poste ŝidigis sur malalta mureto superigardanta horton, riĉa per prosperaj brasikoj. Tie ĉirkaŭe la vasta kaj blanka konstruaĵo de la malliberejo estis preskaŭ kamparo. La civito kaj la homoj estis malproksimaj...

Sonis gardo. Maŭri haltis ĉar li ja estis ekvidinta tiun gardon. Kiom da fojoj li estis aŭdinta ĝin soni — neniam vidinta — el sia mallibereja ĉambreto! Kaj li haltis por ĝin vidi, fine. Malriĉa maljunuleto, ensakigita en malnova senkolorigita kaj ŝirita surtuto, turnis la turnilon. De post multaj jaroj li portis ĉiutage, matene, sian saltetantan muzikon sub la kradoj de la malliberejo: ĉu por doni al la enestantoj iom da lia mizerula konsolo? Kiu scias? eble sole por tio. Ĉar tie li ne gajnis certe soldojn.

Li havis nun ĉirkaŭe amason da knaboj, de ambaŭ seksoj, jus elirintaj el proksima suburba lernejo. Multaj el tiuj knabetoj, kunigitaj, dancis. Kaj Laŭrenco Maŭri aŭskultis la malnovan valson de Straus, tiu de la kisoj kiu estas

en la « Senkombita printempo », kiun tiom da fojoj li estis aŭskultinta tie. Kaj li sentis, ke lin kaptis stranga senkuragigo. La sama, kiu estis preninta Bonivard, la malliberulon de *Chillon*, kantita de la poeto Byron. La mortiga malĝoĉeco dum tiom da jaroj gustumita en lia ĉelo revenis al li impete en la koro kiel kun freneza nostalgio de sia sufero. Ankaŭ li — kiel Bonivard — estis lerninta ami sian malesperon.

Kaj Laŭrenco Maŭri, mallevante la kapon, ploris.

La knaboj estis ĉiuj foririntaj. Ankaŭ la gardo tirita de la maljunulo, malproksimiĝis... Sed iu estis restinta. Malgranda infanino preskaŭ dekjara. Ŝi, proksimiĝinte al mureto ĉe Maŭri, fiksas lin, iom post iom, hezite kiel faras la infanoj kiam ili volus kaj ne kuragas.

Maŭri rigardis ŝin. Ŝi estis mizera figureto de malgrasa infanino, malbone kreskinta, kun la nigraj kaj fruinteligentaj okuloj en la pala vizaĝeto. Kaj la infanino, vidante sin rigardata, proksimiĝis al li.

— Kial vi ploras? — ŝi diris al li.

Maŭri karesis ŝiajn kapharoin. Poste li skuis la kapon.

— Kiu estas via nomo?

— Maria.

— Kion faras via patro?

— Mi ne havas patron.

— Ĉu li mortis?

— Tie — kaj la infanino montris per la mano la malliberejon el kiu li estis elirinta.

— En galero — aldonis al la gesto la malgranda infanino.

Maŭri nenion diris.

Li rigardis la malriĉan robeton, la malnovajn ŝuojn, la palan vizaĝeton kaj la tro viglajn okulojn.

— Ĉu vi havas patrinon?

— Jes, sed ŝi estas malriĉa, malriĉa

— ridetis la etulino — kiel mi!

Kaj aldonis tuj:

— Ĉu vi estas riĉa vere? kaj tiam donu al mi soldon.

— Kion vi volas fari el ĝi?

— Mi volas aĉeti al mi pomon. Ili plaĉas al mi. Sed la patrino neniam aĉetas al mi pomojn.

Maŭri ridetis. Kaj rigardis la malnovajn ŝuetojn.

— Ne, etulino, mi ne povas doni al vi soldojn.

— Ĉu vi ne havas da ili?

— Ĉu mi havas da ili! Ankaŭ tro multe...

— Kaj tiam?

— Tial ke mi estas malbona, tre malbona. Oni faris al mi de magon, tro da demago, kaj mi ĵuris esti malbona kaj venĝi min.

Malgranda Maria ne komprenis tro multe pri tuta tiu ĉi parolado, sed ŝi komprenis tre bone ke la malbona homo ne volis doni al ŝi la soldon, por ke ŝi povu al si aĉeti la pomon. Kaj ŝi disigis severe el la mureto por malproksimiĝi de li...

Sed ankaŭ Maŭri estis leviginta.

— Aŭskultu — ili diris al Marieto — ĉu ni faru aferon? Donu al mi la manon kaj konduku min al via patrino. Kiu scias? povas esti ke al ŝi mi donu la soldon por aĉeti al vi la pomon. Kaj ankaŭ du, tri, tiom, kiom vi volas da ili! Kaj ankaŭ la ŝuetojn... ĉu vi estas pli kontenta nun?

Kaj Marieto, pli kontenta efektive, donis tuj la manon al la bona homo, kiu volis sin venĝi sed, kiu renkontis, apenaŭ renirinta en la vivon de la homoj, malĝojajn similajn al sia.

Trad. A. Bencivenga Barbaro

KIE KIEL KIAM?

ĈIE ĈIEL ĈIAM

NI DEVAS UZI ESPERANTON

:: Kiel kisas la virinoj de ĉiuj popoloj kaj psikologio de la kisarto ::

(Daŭr., v. p. n.)

Oni ne sufiĉe alte taksas la slovakinon, sed jam pro siaj kisoj sole valoras viziti ŝian landon. Ŝi havas la haŭtkoloron de la nordlandano kaj la fajron de la sudlandano; ŝia sindonado estas okcidenta sed ŝia kiso estas orienta. Ŝi klinas ridetante la kapon flanken, la okuloj ekflamiĝas kaj ŝi alpremas la buŝon tiom mole kaj delikate, kvazaŭ ŝi volus iĝi kun la amato unu sola estaĵo.

Kiam la grekino kisas, oni ricevas la impreson, ke ŝia lango volas ekkapti la malantaŭajn dentojn. Ĝi moviĝas de unu buŝangulo en la alian. Ŝiaj kisoj estas mallongaj; ŝi volas nur mem ĝui kaj ne ĝuigi ankaŭ sian amanton.

La kiso de la bohemino estas mola kiel tiu de la slovakino, sed ŝi promesas pli ol ŝi poste plenumas, sed tamen ne tro por esti seniluziiginta.

La kiso de la danino estas internacia, dume la norvega fratino estas pli naiva. Gaje iliaj okuloj rigardas, kvazaŭ dirante: Kaj kio sekvas poste? Ŝia kiso estas peza, malseketa. La svedino, kiu havas el ĉiuj virinoj la plej malgrandan buŝon, kisas volonte kaj elegante, sed oni ne kuraĝas tro, timante ke oni povus difekti la delikatan haŭton. La kiso de la hollandino estas « burĝeca », dume la anglino kisas, kiel decas por honestaj inoj.

Estas inde, ke oni iom pli longe parolu pri la kiso en la lando de la suno, de la amo kaj de la floroj. La kisoj de la italino ĝenerale promesas tro (sed oni ne volas diri per tio, ke ili ne plenumas la promesitaĵon). Se oni estas kisata de virino el la sunplena lando de la sopiro de ĉiuj, oni scias antaŭe ke ami signifas afable, sindone ludi, sed ŝi estas sincera. Agi en la amo tiel povas permesi al si nur ino, kies donacoj estas neelĉerpeblaj, kiel ĉe la italino. Tio estas la ŝlosilo de la sekreto, kial itala ino ĉiam ree estas alloga kaj aminda. Oni povas diri ke la sinjorino de Milano en la kisado estas elektema, la ino el Roma kisas elegante, dume la napolino kisas nenion priprensante.

Ankaŭ la hispanino estas konita en la kisarto. La ino de la regiono Andaluzio estas plejkonita; iliaj lipoj estas ruĝaj kiel ĉerizoj,

ne tro fortaj kaj ne tro molaj. Kisi signifas en sia lingvo ami. Ŝi alkreĉiĝas forte al la amanto, tie ke oni preskaŭ sentas ŝian korbataĵon, kaj kisante ŝi ĝemas kvazaŭ la animo forflugus el ŝi kun la ĝemoj. La inoj de Kastilio kisas kun la koreco de infano, kaj oni ne laciĝas, aŭskulti tiajn senvortajn rakontojn.

La spertinto de tiu ĉi verkaĵo kisis tri virinojn en Portugalujo, sed ĉiuj iliaj kisoj havis la guston de oleo-sardenoj.

La parizanino estas pasia kaj ridetas kisante, la berlinano palpebrumas; ĉe la parizino oni devas alkiŝi al diversaj bruetoj kaj ĝemoj, per povi ĝui neĝenate.

Por ino apud la Rejno la kisado estas serioza; al ŝi mankas ĉiu seriozeco kaj iliaj kisoj estas bona frandaĵo.

La Münchenano ne scias kion fari kun la kiso. Ŝi interrilatas al ĝi kiel la « antaŭparolo » en libro. Ŝiaj kisoj estas malseketaj, varmaj kaj fortaj.

La ino el mezgermanujo balancetas la kapon kaj kisas dolĉe. Por la amato kaj por la infano ŝi havas la saman kison.

La virino de Vieno estas majstrino en la kisarto; ŝi volonte kisas kaj la kiso estas por ŝi ĉio. Ŝi ridas, ploras, petas, konsolas, trompas, mensogas, donas, prenas, pardonas, petolas, sed per unu sola kiso oni povas tranĉi ŝin, silentigi ŝin.

La ciganino tute ne scias kisi; ĉio, kion oni legas pri tio en romanoj estas mensogoj, ĉar ŝia opinio pri tiu ĉi ceremonio estas morganola.

La amerikano konas oficiale nur la laŭtaktan kuntuŝiĝon de la du liparoj; estas afero de konveneco. Sed oni rakontas, ke en la kaŝita ĉambreto ŝi posedas ne ĉiutagan kapablon kaj emon al la kisado; varieco plej plaĉas al ŝi.

Ankaŭ la meksikanino estas tie ĉi citinda. Ŝi similas en sia temperamento al la hispanino, kiu ŝi ja iam estis. Sed ŝiaj kisoj estas tiom pasiaj kaj ardaĵ, ke oni kredas esti sur la vulkano Popocatepetl dum erupcio.

(daŭrigota) el germ. Joh. Bernhard, München (repr. kaj trad. malpor.)

SCIENCO KAJ VIVO

La homa stomako kiel trolaboranto.

Ke la moderna kultura homo tromanĝas, estas observo, kiun la kuracisto povas fari senĉese. Nia stomako daŭre devas fari « superlaboron », sed ĉar la procedo de la digestado ne povas esti akcelata kiel tiu de la cerbo aŭ de la nervoj, nia stomako ne povas ripozi kaj estas daŭra trolaboranto.

La angla nutrajfiziologo Gallichon pritraktas tiun ĉi tronutradon en tre leginda artikolo Rost-befo, li skribas, bezonas por la digestado plenajn kvar horojn, pano same; rostita ansero, sekigitaj faboj aŭ salitaj fiŝoj ne povas esti digestataj en malpli ol 5 horoj.

Ĝenerala manĝo kiel ni kutimas fari donas al la stomako laboron de 4-5 horoj. La ofte ankoraŭ trovebla kutimo, preni ĉiutage 4 manĝojn, metas la intestojn antaŭ taskojn, kiujn ili nel povas plenumi.

Estas unu el la plej gravaj eraroj, neforigebaj de la laikoj, ke nia « maŝino » daŭre devas esti « hejtata », por ke ĝi havu fortojn.

La stomako nur laboras normale, se al ĝi estas permesataj prudentaj paŭzoj. Eĉ dum la dormado ĝi devas ankoraŭ forte labori, se oni ĉirkaŭ 1 horo antaŭ la enlitiĝo estis ankoraŭ manĝinta ion.

Ni permesas ripozon al la muskoloj post trostreko; ni donas al nia cerbo dum la dormado refreŝiĝon. Sole la bedaŭrinda stomako devas senĉese laboregi.

Oni donu al ĝi 3 bonajn manĝojn ĉiutage, aŭ pli bone nur du, tagmeze, kaj ne tro malfrue, vespere!

trad. Joh. Bernhard

La originalo de « Mil kaj unu nokto », trovita.

Laŭ Petersburgaj gazetoj estis trovita en la tlea publika librejo antikva, flaviginta manuskripto, skribita perslingve. Tiu manuskripto estis transdonita al la rusa scienca akademio kaj la konata sciinto de la persa lingvo kaj literatura profesoro Marr fervore certigas, ke tio estas la originala manuskripto de la famkonata persa fabelaro *Mil kaj unu nokto*. — Tiu manuskripto datumas el la mezo de la XV-ajarcento kaj estas unu el la maloftaj antikvaĵoj de la persa regno, kiun oni certe opiniis de longe perditaj. — La valoro de la manuskripto estas

granda. Oni ĝin konservas nun en unu el la rusaj naciopopolaj muzeoj kaj oni konjektas, ke ne ekzistas kopio pri tiu valora originalo. el Marto

Kion pereigas la lupoj en Ruslando.

Antaŭ nelonge publikigis la sovjetlanda registaro statistikon pri la viktimoj de la lupoj vivantaj dumvintre en ruslandaj kaj precipe en sibiriaj distriktoj. Laŭ tiu statistiko pereigis la lupoj lastjare 52.000 ĉevalojn, 50.000 bovojn kaj 25.000 aliajn bestojn. Neenkalkulitaj estas bestoj vivantaj libere en la naturo kaj ĉasataj pro la pelto. La ekonomia malprofito kaŭzita de la lupoj suniĝas je 4 milionoj da orrubloj. La popola komisario pro agrikulturo postulis krediton de 100.000 rubloj uzota por la ekstermado de tiuj rabistoj. el Marto

La lando de gigantaj bibliotekoj.

Dum la lastaj dek jaroj sukcese progresis la libromanio en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko. Laŭ la lasta kalkulo estas tie ĉirkaŭ 2000 publikaj bibliotekoj. La relative plej grandan nombron de bibliotekoj posedas la ŝtato Massachusetts. Tie ekzistas 257 grandaj publikaj librejoj. Plue estis registritaj 146 en Ŝtato New-York, 111 en Illinois, 105 en Kalifornio, 96 en Pensilvanio, 81 en Connecticut, 80 en Ohio, 78 en Fadio, 71 en la ŝtato Iova, 67 en Michigan. La plej granda biblioteko estas la kongresa biblioteko en Washingtono; ĝi enhavas 3,179.000 binditajn librojn. La plej granda biblioteko de la urbo New-York havas 2,774.000 binditajn volumojn, tiu en Boston 1,308.000 en Chicago 1,305.000, en Hoboken 1,001.000 kaj en Brooklyn 955.000. La 2^a plej granda publika biblioteko en Washingtono havas 936.000 volumojn, la biblioteko en Clevelando 807.000, en Cincinnati 670.000, en St. Louis 649.000. Entute ekzistas en Usono 17 grandaj institutoj por edukado kaj klerigado de bibliotekistoj. el Marto

Ĉu la abeloj fakte estas diligentaj?

Apenaŭ ni ajn trovus la kuraĝon diri, ke ne diligenteco ja estas proverba. Statistika observado renversas almenaŭ iomete tiun ĝisnunan opinion pri la multlaboremo de la abeloj. Per longdaŭraj observadoj oni konstatis, ke la abelo pasigas plimulte da tempo ripozante en la abelujo ol kolektante mielon. Dum sia tuta vivo ĝi forflugas el la abelujo ĉirkaŭ 3165 foje. Por produkti 1/2 kg. da mielo laboras 567 abeloj dum sia tuta vivo. el Marto

DIVERSAĴOJ

Kugletoj pasas, Mussolini restas.

Kaptinte la konatan frazon elparolitan de la Duce (elp. Duĉe) dum sia ĵusa parolado ĉe Placo Duomo en Milano, kamarado Oreste Reali, iama tranĉeano de la Prezidanto dum la milito, sendas al *Popolo d'Italia* ĉi tiujn notojn.

« Kugletoj pasas, Mussolini restas ». Estas vere. Sur monto Quel Taron - unuallingva loko - kontraŭ fortikaĵo de Malborghetto, ian tagon Mussolini (tiel nomata ĉar nur kaporalo li estis) raziigis sian barbon de bersaljero Bernini. Ambaŭ ili kaŭris en angulo de blokhauŝo kiun dume trapasis grenado. Bernini, pursanga toscano, sendas al la malamiko mil blasfemvortojn kaj samtempe Mussolini ridetante ekkrias: « Daŭrigu, Bernini; estas nenio. Oni volas akriigi vian razilon ».

* *

Dum plotono da volontuloj (tiam signitaj per siglo V. E.) intente ŝajnigi atakon sur deklivoj de monto Fella Gramuda (1 Aprilo) grenado frapis kaj transboris teramason. Sur la teramaso sidis kaporalo manĝanta panon kaj fromaĝon. La neatendita ĵetaĵo lin igas nervema kaj lin ekkriigas: « Eĉ kiam oni manĝas oni ne estas certaj pri la fino ».

Ankaŭ tiuj fojnoj la ĵetaĵo pasis kaj Mussolini restis.

* *

Mussolini kaj la skribanto malsupreniras el deklivoj de Rombon kaj envojiĝas por ĝui ricevitan libertempon. Tiun tagon la aŭstriancoj celis detruon de pasejo sur la rivero dividanta Rombon de Javorĉek, per pesa artilerio. Ektrairante la ponteton, kelkaj ĵetaĵoj preterpasas terurige fajfante! Kaporalo Mussolini, surprizita pri tiom da afableco de la malamiko, ekkrias: « Haltu, Reali, tiuj sinjoroj emas rapidi, ilin lasu antaŭeniri ».

Ankaŭ tiuj fojnoj kugloj pasis kaj Mussolini restis.

* *

Dum Februaro 1916, neatendite elveturintaj el Ferrara (eĉ sen paskarto) al batalfronto ni haltis ĉe Udine elprovante eniron en

urbon. Sed por soldatoj estas eniro malpermesata, do reveno en stacidomon kaj matenmanĝo per brunpano kaj skatoleto da viando. Ni legas gazetojn kaj ĉar la soldatvagonaro al Cividale nur pasos je noktomezo, per kovriloj ni aranĝas kuŝejon por dormi, atendant. Kiam dormo nin regis, neĝentile du karabinieroj nin vekas, demandas kaj postulas vojaĝ-dokumentojn. Kiaj? Kiel dirite ni forveturis el Ferrara, nefinite nian priresanĝan libertempon, jam lacaj pro mallaboro. Nun komencas embaraso. Persistaj en la plenumo de sia devo la karabinieroj volas... envidi klare! Mussolini, neperdinte kvietecon, ekridante montras al ili gazeton *Popolo d'Italia* kaj legigas frazon « fondinto Benito Mussolini ». Poste konstatis al ambaŭ ke sama nomo estas sur sia identiga medalo « Ah! vi estas gazetisto, bone, trairu ». Kaj permesis la eniron.

Ĉu tiuj du bonaj militistoj rekonos hodiaŭ en la gazetisto Mussolini nian grandan Duĉe'on?

Epizodoj travivitaj. Epizodoj veraj. Pri aliaj similaj estis aktoroj miloj da batalintoj, sed ne ĉiuj havis spriton - kiam ĉirkaŭte eksplodis grenadoj - diri al barbisto raziinta sian barbon: « Daŭrigu. Estas nenio. Oni volas akriigi vian razilon ».

Laŭ stilo de Duĉe'o.

Trad. M. Arabeno.

Legendo.

Kiam la bona Dio kreis la Ĉielon kaj la Teron, Li donis nomojn ankaŭ al la kreskaĵoj.

Kaj venis floroj de pluraj specoj al kiuj la Sinjoro donis simbolajn nomojn.

— « Sed » — Li diris — « memoru la nomon, kiun la Sinjoro via Dio al vi donis. »

Tiam venis ĉielkolora floreto kaj demandis: « Sinjoro! Kian nomon Vi al mi donis? Mi ĝin forgesis ».

Kaj la Sinjoro parolis: « Ne forgesu min! ». Tiam la floreto hontis kaj kaŝis sin ĉe la silenta rivereto, en la malluma arbetaro, en la soleco — kaj furiĝis malĝoja.

Se tamen iu ĝin serĉas kaj deprenas, ĝi murmuretas: *Ne forgesu min!*

trad. B. Migliorini

Skribu en Esperanto

al niaj anoncantoj pri informoj, prezaroj ktp. citante nian Revuon!

ITALA KRONIKO

ESPERANTO-GRUPO EN UDINE INAUGURAS SIAN PROPRIAN SIDEJON

Kiam en la ĉefurbo de Friulprovinco oni starigis Esperantan Grupon (la 6-an de Junio 1923) la klopodoj de la tiamaj Grup-estraroj streĉe celadis la havigon de propra, sendependa sidejo, kies manko estus kompromisante, parte (krom la ekzistado de la Grupo mem) ankaŭ la sukcesan, regulan, daŭran disvolvigon de la lokaj propagandaj kaj varbadlaboroj. Nun, post longaj penadoj, la ĉiama revo de la Udine'aj esperantistoj fariĝis, fine, realeco. De nun la loka Grupo havas, en centra urba parto, propran kunven-ĉambron ĉe urba palaco por kultur- kaj profes-societoj.

La grupa sidejo ĉi-vespere estas malfermata kaj, regule, ĉiujade je la naŭa horo, okazigas instru- kaj amuz-ĉele, membro-kunvenoj. Historia paĝo por la loka movado ekkomenciĝis la 6-an de Majo nunjara, inaugurate la Grupejon. Pro tiu celo, tiam la cambrego estis lukse kaj plej ĉarme ornamita per esperantaj kaj naciaj flagoj; sur la muroj ĉiaspekaj reklamiloj estis alisigitaj; tuteirkate allogaj vazoj kun, plantitaj arboj starigitaj; sur la tabloj, krom arego da propagandiloj, estis dissemataj multe da floroj. Floroj kaj folridaj arbo-branĉetoj same ĉirkaŭis la buston de nia Majstro, majeste staranta sur la estrara tablo. La tuto belege aspektis kaj impresigis la partoprenintojn.

Je la naŭa precize la agema Grup-prezidanto sam. Franco Bodini, malfermis la inaugurfeston. Li dankis ĉiujn ĉeestintojn kaj plej varme dankis la lokan urbestaron pro la al ni disponigita bela ĉambro. Fajre kaj brile rakontis pri la fonda de la Grupo kaj sia disvolvigo ĝis la nuna (por ni neforgesebla) festo-tago, informis pri la faritaj (-ataj kaj -otaj) laboroj, aldoninte ke la sidejo ĉi-vespere estos je la dispono de la grupanoj, kiuj trovos tie diversajn legajojn (esp. kaj alilingvajn) krom kelkaj societ-ludiloj. Sciigis ankaŭ ke, pere de la grupo, baldaŭ estos eldonata ilustrita histori-gvidlibreto de Udine, kunmetita de loka U.E.A.-Delegito, sam. G. Della Savia.

Finite la interesplena parolado, la Prezidanto petis la samideanojn are senmanke kaj kiel oble plej regule partopreni la grupkunvenojn, kies laborprogramoj ĉiam estos por ili plej agrable kaj zorge aranĝotaj.

Krom aro da gegrupanoj, partoprenis multe da simpatiantoj, invititaj per taggazet-artikoloj; ĉiuj ĉeestintoj, senescepte, estis plej favore impresigitaj pro la simpla, intima Grup-festo.

El la semita, -ata kaj -ota homama esperanta ideo, la Grupo de Udine atendas fruktorekan rikolton estontempe. Duane, plentide kaj senlace « ni fosas nian sulkon! »

(Raportis la Grupa Sekretario)

Cremona. Tre bone sukcesis parolado de Gen. de Montezemolo sub la patronado de loka komerca ĉambro.

Genova. La 4-an de Majo nia bonkonata svisa samideano, publicisto kaj eldonisto, S-ro Jean Borel, prelegis en E. ĉe la Popola Universitato Contardo Ferrini pri « Rememoroj de esperantista vivo ».

Personaj spertoj kaj rememoroj de lia iama Volapükigo kaj posta aliĝo al nia lingvo kaj ideo, lia unua renkontiĝo kun la Majstro en Varsovio, kun la tiamaj unuaj esperantistoj, la Bulonja Kongreso, la komerca laborado de la Genevaj samideanoj « ankoraŭ en pantalonetoj », pasis antaŭ la spiritaĵoj de la aŭdantaro havigante al ĝi la intiman ĝojon de unuhora esperantisma ĝuo.

Al nia afabla Samideano ni ripetas la esprimon de nia kordanko.

Napoli. La 28-an de Marto en la nova sidejo de la Esperanta Rondo, samideano Prof. D-ro Tammaro Gr. Uff. Salvatore, legis sian belan paroladon « La kiso tra la historio, la literaturo kaj l'arto ».

La multnombra ĉeestantaro, esperantistaj kaj amikoj de Esperanto, ravitaj de la varma kaj instrua parolado, korege aplaudis kaj gratulis la kleran paroladiston. Oni ludis poste fortepianon, oni kantis kaj diris versaĵojn. La bela vesperado finis per gajaj dancoj.

★ Loka Grupo « Circolo di cultura esperantista » estas fondita kun 75 membroj. Oni elektis prezidanton tre fama Admiralo Kav. Eugenio Trifari. Kunvenoj okazas en la sidejo: Via Duomo 202.

Parma. Laŭ iniciato de la loka Esp. Grupo la 9-an de majo ĉe la Teatro S. Giovanni, antaŭ granda publiko, je la ĉeesto de Lia Ĉefepiscopa Moŝto, de la Rektoro de la R. Universitato, de la Lernejoj Inspektoroj de Parma kaj de Piacenza, de la riprezentantoj de la Milita Lernejo kaj de la loka garnizono k. t. p. okazis la inauguro de arta busto de nia Majstro, tre bele skulptita de P-roj Canattieri kaj Cacciani. Jen la programo: Ludado de la Reĝa itala marŝo; malĝovo de la busto kaj ludado de la « Espero » per granda orkestro; P-ro P. M. Caroli trate priparolis pri la socia kaj morala figuro de Zamenhof; sekvis varmaj, juneprenaj kaj entuziasmaj vortoj de Lia Generala Moŝto Markizo de Montezemolo, kaj oportuna kaj interesa legado de kelkaj esperantaj poezioj de nia samideano F. Pizzi. Inter unu kaj alia parolado Fraulino Hazon arte ludis tre interesajn harpajn muzikpecojn.

Ĉu la paroladistoj, ĉu la ludistino de la harpo kaj la orkestro estis tre aplauditaj La bela ceremonio bone impresis la publikon, kiu alie jam konas la esperantan movadon pere de la vigla agemo de la loka gesamideano. Rimarkita la ĉeesto de Sino Hodler, de S-ro Facchi el Brescia kaj de S-ro Quarone el Voghera, de Fraulino Zinzani por la loka virina Fascio.

Trento. La 14-an de Majo en salono je la unua etaĝo de Hôtel Centrale okazis inaŭguro de semajna kunveno de Trento E. Rondo. Prezidis la simpatian feston la prezidanto de la klubo, rag. Zanolini kaj la direktoro de Trentlanda E. Instituto prof. Mosna, kiuj je la toasto diris taŭgajn vortojn, varme aplauditaj de la multnombra ĉeestantaro.

La kunvenoj okazas ĉiuvendrede je la dudeka, kaj estas plezure akceptataj ĉiuj samideanoj dezirantaj tie kunveni.

Verona. La 19-an de majo okazis eksterordinara kunveno de Verona E. Asocio (sidejo, strato Sottoriva 6). Sekve la eksigo de administra konsilantaro, oni elektis la novan, kiu tiel rezultis: Rag. Aldo Tedesco prez., Rag. Amerigo L. Reni viceprez., Zeno Ballarini sekr.-kas., Giovanni Uberti vicesekr., F. no Cesira Morandini kons.

★ **Kunveno.** Pro iniciato de E. Grupoj de Verona kaj Brescia la 30-an de majo okazos kunveno en Gargnano sur Garda lago, al kiu partoprenos gesamideanoj el Lombardia, Venet- kaj Trentlando.

Le notizie di cronaca devono essere inviate entro il 15 del mese.

RECENZAJ NOTOJ

Esperanta Albumo de Salzburg. In occasione del V Congresso Esperantista Panaustriaco, il Gruppo Esperantista di Salisburgo pubblicò un album di propaganda turistica e commerciale, compilato dal signor Riccardo Grössinger. Questa pubblicazione deve essere sfuggita all'attenzione del mondo esperantista italiano perché non ricordo di averne trovato cenno in alcun luogo. Eppure essa merita di essere tenuta presente come uno sforzo di buona volontà, degno di imitazione e per la sua praticità e per la bellezza dell'edizione. L'album, di formato 28x30, porta nel mezzo di ogni foglio una splendida veduta della patria di Mozart ed in giro la réclame delle case commerciali più considerevoli della città. Anche chi non conosce abbastanza da vicino ed ignora la incomparabile bellezza del suo eccezionale panorama, leggendo questo opuscolo si sente invogliato a visitarla.

Anche le città italiane dove hanno luogo annualmente i congressi nazionali dovrebbero seguire l'esempio di Salisburgo, che rappresenta la migliore forma di propaganda locale dell'idea esperantista.

A. Mondini

Tipografia Editrice A. Paolet, S. Vito al Tagliamento.
A. Paolet, dir.-resp.

Hotelo kaj Pensiono
"MINERVA,"
... VENEZIA ...

Nia tre konata kaj ŝatata Samideano Rev. Prof. P. Modesto CAROLFI havis la malfeliĉon perdi sian amatan PATRINON, mortinta la 15-an de tiu ĉi monato.

La itala esperantistaro kune unuigas por esprimi al Li kaj al Lia Familio siajn plej varmajn kondolecojn.

Preĉipe partoprenas Lian doloron la direkto kaj la redaktoroj de la Revuo, kiun Li ĉiam amis kaj subtenis.

En Altare mortis Rag. Pilade, frato de samideano Ivanoe Bordon. Al la Familio sincerajn kondolecojn.

NASKIGO

Al samideano Guglielmo Viani el Parma naskigis ninon, al kiu oni donis la nomon Estina.

Infaneto, al kiu oni donis la nomon Antonio Esperido, naskigis al samideano Manili Nazareno en Mascioni.

Al la goodzoj Dina kaj Fernando Zacchè, gesamideanoj en Mantova, naskigis filineto nomita Fernanda Benita. Gratulojn kaj benediktojn.

NOZZE

Il 1-o Maggio l'egregio Presidente dell'Associazione Esperantista di Torino, Ing. Giovanni Cenoro, ha stretto il dolce nodo coniugale con la gentile samideana Signa Itala Ventre, nipote dell'eminente Grand'Uff. Avv. Giuseppe Gianni, Direttore dell'Istituto Piemontese di Esperanto.

Al novelli sposi giungano gradite le sentite felicitazioni ed i vivissimi auguri di tutta la Famiglia Esperantista Torinese.

INTERNACIA RADIO-ASOCIO.

Prezidanto: HARRY A. EPTON.
D-ro PIERRECROBRET (S.A.E.) 17 Chatsworth Road, London, E.5, Anglujo.

CELOJ. 1. Faciligi rilatojn inter Radiuloj tutmonde por la lingvo Esperanto.

2. Liveri teknikan helpon kaj informon de Internacia karaktero por Esperanto al ĉiu interesita pri Radio, Esperantisto aŭ ne.

3. Ellabori la Esperantan radio-vortaron.

4. Eldoni « Internacia Radio-Revuo », kiu, interalie, per Esperanta resumo de originalaj artikoloj el diversaj lingvoj disponebligas al la legantaro teknikajn dokumentojn alie nehaveblajn, kaj kompreneblajn nur tre malfacile.

5. Pritrakti ĉion alian, kiu estas en la kampo de Internacia Radio-Asocio ĉi tie.

MEMBRECO. Povas membriĝi ĉiu persono, Esperantisto aŭ ne, kiu sin interesas pri Radio, amato aŭ profesie, kaj favoras la adopton de Esperanto kiel la internacia Radio-Lingvo.

KOTIZO. La jarkotizo, en Britujo estas 1 ŝ., alilande unu svisa franko aŭ ties ekvivalento; kiun oni pagu al la Hon. Sekretario je la adreso supre montrita, aŭ al Nacia Sekretario kie tia ekzistas. Tamen, ĉar tia malalta kotizajo ne sufiĉas por pagi ĉiujn elspojojn, oni estas petata aldoni iom kiel donaco.

NACIA SEKRETARIO. La Nacia Sekretario por Italio estas: Prof. Giovanni Saggioli, Corso Vitt. Em. 6, Padova Telef. 14-50.

Unnaranga kaj rekomendinda restadejo por Esperantistoj. - Tute renovigita dum 1925. - Trankvila kaj urbocentre lokata. - Moderna komforto. - Ĉiu ĉambro kun fluanta akvo. - Esperanta servisto ĉe la fervoja stacidomo. - MODERAJ PREZOJ. En- kaj elŝipigejo S-ta Zaccaria

KONIGU ITALION.

Itala Delegito ricevis tiun ĉi leteron. Ne povante sin okupi pri la demando, petas ke ni publikigu ĝin en la Revuo, ĉar verŝajne travigas, inter la legantoj, iu persono kiu povos respondi. Jen la letero:

Arad, la 13-an Aprilo 1926.

« Literatura Rondo de Vesperuniversitato en Arad » aranĝos laŭvice ĉiu-monatan literaturan posttagmezon el literaturo, muziko kaj danco de aliaj nacioj. Nia celo estas por konigi, popularigi alilandan popokulturon per esperanto. Tiel ni intencas vekti la interaĝon ankaŭ inter neesperantistoj, kiuj multnombro vizitas niajn literaturajn festojn. Tiu-ĉi estas ja intereso de ankaŭ ĉiuj nacioj.

Laŭ vico, baldaŭ sekvas en nia programo la itala nacio.

Pro tio ni havas la sekvantan peton: Bonvolu kolekti kaj sendi al ni la italan popolan karakterizantajn-esperantlingvaj-n literaturajn t. e. priskribojn, novelojn el popolvivo, versafojn, popolkantojn, serenadojn vere italajn melodiojn por solkanto, ĥoro aŭ por duaj instrumentoj kun akompano kaj oble muzikajoj por nacia danco. Generale samfakaj aĵojn kiuj - laŭ via opinio - karakterizas la italan popolon. Kiel la literaturajojn, tiel la tekstojn de kantoj - ni petas - nur esperante.

Nia itala literatura posttagmezo estos vera festeno. Unue popolo nia tre interesiĝas je italoj, tre ŝatas italan muzikon kaj krome partoprenos la « Arada Itala Rondo », do ili povos ĝui iom hejman kulturon.

Laŭ via deziro, ĉiujn aĵojn ni resendos kaj pri sukceso ni sendos raporton por italaj esperanto-gazetoj.

Esperante ke ankaŭ vi havos ĝojon por kunlabori por nia komuna intereso ni dankas antaŭe Vian agadon.

Samideano salutis vin Ferenczy.

gvidanto de « Literatara Rondo ».

Adreso: Literatura Rondo de « Vesperuniversitato » por Prof. Stefano Ferenczy - Arad, Beola Josif Vulkan.

DANKESPRIMO

Rev. Pastro Bilbao el Vizcaya (Hispanujo) dankas la samideanojn de Tolouse, Nice, Marseille, Genova kaj Romo pro tiuj servoj dum la vojaĝado de sia pilgrimado al Romo, ĉar ke en ĉi tiuj urboj li estis gentile, afable kaj sindone akceptita.

NOVA ELDONAĴO

P. Prof. M. CAROLFI O. M.

LA PADOVA LILIO

Mallonga Biografio de

S-ta Antono el Padova

kun antaŭparolo de A. C. kaj aldona ĉapitro de F. Pizzi pri *Si quæris miracula* (kun 23 artaj ilustraĵoj)

Prezo L. 5

Tre modeste la simpata aŭtoro, kiu parolis en 1925 en Genovo dum la malfermo de la Somera Universitato kaj predikis dum la Katolika Diservo esperantlingve, nomas, elan verkon mallonga biografio. Fakte ĝi sin prezentas kiel serioza pritrakto ne nur de la vivo kaj laboro de la sanktulo, sed ankaŭ de la historio de Italujo kaj Francujo en la tiama epoko. Prof. Carolfi lasas nin rigardi profundon en la ekloziaj historioj, por ke ni tute komprenu la vivecon de la pia monaĥo, kiu farigis « kolono » en la katolika aklezo kaj patrono de la Francekanaj Mislaj.

Multaj bildoj ornamas la 34 ĉapitrojn, kiujn enkadrigas la volo kaj la plenumo de heroo, kies voko admonas kaj kuraĝigas la junularon. Pro tio ni estas konsciaj, ke la aŭtoro kaj gvidanto de la Tutmonda Katolika Junularo Esperantista plonrajte dediĉis sian verkon al tiuj, kiuj elektis la grandan sanktulon oĉtro kaj spirita gvidanto, kiun imiti deca estis plej alta devo.

La modelingva kaj bonpresita libroto estas bona kaj tre rekomendinda legaĵo por niaj katolikaj gefratoj.

Heraldo de Esperanto

Tiu ĉi mallonga biografio de sankta Antono el Padova, ilustrita per 23 artaj reproduktadoj, bone vekita de nia nelaciĝa samideano Pietro Carolli, kaj sur bona papero presita de la eldonejo de Itala Esperanta Revuo, konigu en Esperantujo la vivon de tiu, kiu tutrajte pro lia rimarkinda pureco, estas nomita la Padova Lilio, kaj jam estas tutmonde konata kaj progata. Jen vivo de sanktulo loginta de ĉiuj niaj legantoj.

Espero Katolika

Publicazioni per lo studio dell'Esperanto

Manuale di Esperanto in dieci lezioni con due

vocabolarietti, di B. MIGLIORINI (40 m.) L. k. 50

Manuale completo per lo studio della lingua

internazionale ausiliaria Esperanto del Dott.

A. STROMBOLI, terza ediz. (160 migl.) . 5.—

— rilegato elegantemente in tutta tela . 7.—

Manuale completo di Esperanto (prima annata

della rivista « L'Esperanto »), con molti ar-

ticoli sull'Esperanto e sulle sue applica-

zioni . 3.50

Esperanta Legolibro de B. kaj E. MIGLIORINI

(edizione 1925) . 4.—

Manuletto di conversazione Ital.-Esp. . 1.—

— elegantemente rilegato tutta tela . 2.—

Due Ekzercaro de D-ro L. L. ZAMENHOF kun

itala traduko . 1.—

Aggiungere il 10 % per spese postali

Vaglia all'Editore A. Paolet - S. Vito al Tagliamento

Ĉe la aliaj la teorio, ĉe ni la praktiko.

LA FLORETOJ DE SANKTA FRANCISKO

ESTAS aperonta la esperanta traduko de tiu ĉi ora verko de la unuaj tempoj de la itala literaturo. Gustatempe ĝi aperas, ĉar la sepajcenta datreveno de la morto de la granda itala sanktulo, kiun la tutmondo honoras, rememorigas unu el la plej eminentaj homoj kiuj vivis sur nia terglobo.

LA FLORETOJ priparolas pri Sankta Francisko, pri multaj liaj kunfratoj kaj pri la rapida disvastiĝo de tiu religia Ordeno, kiu konkeris spirite la tutan mondon kaj al kiu multe ŝuldas la nuntempa civilizacio.

La originala stilo de la verko, stilo rakonta, naiva sed tre elokventa, transportas nin al tiu tempo, en kiu la priskriba forto estis pro sia simpleco pli trafa al la sentoj de la popolo.

La esperanta traduko, farita tre diligente de nia lerta samideamo *F. Pizzi*, tute ne perdas la unuan stilon, tiel ke eĉ en Esperanto la verko sin prezentas en sia tuta originala kaj simpatia formo.

La ekstertandaj samideanoj tute certe salutos kun plezuro la aperon de tiu ĉi traduko, kiu donos al ili la eblon de la gojiga legado de unu el la plej legendaj verkoj de la antikva itala literaturo.

Samtempe la italaj esperantistoj devas goji, ĉar per la esperanta traduko la verko, kiu apartenas al la unuaj gravaj monumentoj de lia patruja literaturo, povos esti konata en la tutmondo.

La volumo estos presata sur bona papero per klaraj preslitteroj, kaj ĝi havos artan kovrilon laŭ stilo de la epoko en kiu vivis la sanktulo.

PREZO L. 6.—

Oni preparos ankaŭ simplan eldonon, kiu kostos L. 5.—

Antaŭmendojn al eldonanto A. PAOLET, S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italio)

Ordo de la VII FRANCISKANA CENTJARA DATREVENO legu:

- | | |
|--|--------|
| BIOGRAFIO DE S. FRANCISKO EL ASSISI (Carolfi) | L. 3.— |
| TRA LA FRANCISKANA URBO ASSISI (De Carolis) | • 2.— |
| LA PADOVA LILIO (Biografio de S. Antono el Padova) (Carolfi) | 5.— |

(Aldoni 20 % por sendolpezoj)